LEA/G - INFORMILO

Libera Esperanto-Asocio en germanlingvaj regionoj

Eldono nro.1 (2003)



Asocia sidejo/Anschriften
Sekretario Jiri Proskovec
Heimbaustr.10, 44143 Dortmund
Tel: (0)231 – 551 211
ePost: proskovec@mac.com
Konto: 4 907 664 100
Norisbank AG, Dortmund,
(BLZ 760 260 00)
de Jiri Proskovec

Redaktas/Verantwortlich für:
LEA/G-INFORMILO – A F.Stephan
Renchener Str.47
77704 Oberkirch (Baden)
MAGAZINO per interreto–Gary Mickle
Brüsseler Str.6, 13353 Berlin
Interreto: GMickle@NexGo-DE

Konsilantoj: Friedel Bues
Hans Rodewig, amb.Hannover

Revizoroj: K.H.Kersting,
Bredowstr.3, 45139 Essen
Johs.Jankowski
Am Wemphof 5, 44379 Dortmund

Libroservo: Dr.Wolfgang Schwanzer
Pfarrer-Seeger-Str.9, 55129 Mainz
Tel: 06136/46232

La informilo aperas minimume 2-foje jare. Abono/subteno: 10 €
Membreco 8 € inkl. liveradon de la informilo k. asociaj servoj

Kara legantoimembro,
bv. ne forgesi pagi vian kotizon/abonprezon al la konto de Jiri Proskovec (vd.s.)
Elkoran dankon!

Jen...

estas la unua numero de la LEA/G-Informilo. Pro diversaj kialoj ne plu estas ebla, eldoni nian revuon *MAGAZINO.* Aliflanke ebligas Gary Mickle ke la organo aperas interrete.

Por informi tiujn legantojn, kiuj ne uzas interreton, ni levis la *LEA/G-Informilon* el la bapto. Ni volonte esperas, ke la enhavoj trovos vian aprobon.

Volonte ni aŭdos vian opinion (perletere), akceptos viajn kontribuojn (tekstoj k.t.p.) kaj novajn membrojn kiujn vi varbos.

Por lerni Esperanton oni trovos helpon en la lingva angulo.

Finfine la redaktanto petas pardonon pro skribaj eraroj li ricevis novan komputilon kaj devas ege studi la metodojn uzi la aparaton.

Dankon!

Salutas vin elkore kaj deziras al vi k. la familio sanon kaj bonon por 2003.

via redaktanto A.F.Stephan

Esperanto – ein Ausweg aus Babylon?

Die Esperanto-Gesellschaft Düsseldorf kann auf 95 Jahre Bestehen zurückblicken. Das ist der Anlaß, die Geschichte der Esperantobewegung in dieser Stadt und darüber hinaus zu schildern.

Edeltraud und Hans Jürgen Mattusch, beide aktiv für die neutrale Sprache Esperanto tätig, haben Tatsachen, Fotos, Einzelheiten und vieles mehr in monatelangem Einsatz ermittelt, notiert und archiviert, um schließlich daraus ein Werk zu schaffen, das jetzt vorliegt. Viele Freunde der Sprache und das Fritz-Hüser-Institut in Dortmund, wo Esperanto-Zeitungen, -bücher, -Fahnen u.a. archiviert sind, haben Material zur Verfügung gestellt.

So ist ein Buch mit 205 Seiten entstanden, das lesenswert ist. Der Sohn, Michael Mattusch, hat das Werk gestaltet.-

Den Autoren und all denen, die irgendwie mitwirkten, sei Dank. Die umfangreiche Literatur der Weltsprache Esperanto ist um eine erstklassige Arbeit bereichert.

AFS

(Es kann bezogen werden bei:
A.Stephan, Renchener Str.47
77704 Oberkirch (Baden)
>Preis: 10 Euro zzgl.Versand

Esperanto, solvo al Babylon?

La Esperanto-Societo Düsseldorf ekzistas jam 95 jaroj. Tio estis la motivo, la historion de la Esperanto-movado en ĉi tiu urbo priskribi, - Edeltraud kaj Hans Jürgen Mattusch, aktivaj esperantistoj, havigis dum monataj laboroj faktojn, fotografiojn, detalojn kaj multe pli por fine ellabori verkon pri la Esperanto-vivo en la urbo.

Multaj amikoj kaj la Fritz-Hüser-Instituto en Dortmund liveris materialon. La filo Michael Mattusch formis la libron.

Ĝi estas vere legebla, informas pri la Esperanto-vivo ek de la jaro 1887.

Dank'al la aŭtoroj kaj helpantoj.

La brosuro estas havebla ĉe :
A.Stephan, Renchener Str.47
DE-77704 Oberkirch (Baden)

Prezo: 10 Eur. plus ekspedkostoj.

Europo kun 21 lingvoj

Per kiu lingvo esprimiĝos Eŭropo kun 25 membraj Ŝtatoj? La demando ankoraŭ ne estas solvita sur la politika kampo, sed ĝi aspektas pli kaj pli grave okaze de la debatoj pri la sekvoj de la pligrandiĝo de la Unio.

Post la aliĝo de 10 novaj regnoj, la nombro da lingvoj uzataj en la Eŭropa Unio transpasos de 11 al 21, kaj eksplodigos la nombron da interpretistoj kaj la koston de iliaj taskoj. La Komisiono kaj ĝiaj diversaj servoj devus dungi ĉirkaŭ 400 interpretistojn aldone al la nunaj 3.500, kaj forte kreskus la buĝeto (tio estas 95 milionoj da eŭroj) destinita por tradukado.

Nun en Bruselo, la oficistaro ne antaŭmetas precizajn ciferojn. De sia flanko, la Eŭropa Parlamento devontigis sin al pluigo de la principo de kompleta plurlingvismo por la debatoj, tamen kun kelkaj limigoj. Se ĝi realiĝos, la transpaso al 21 lingvoj tamen kostos al la Asembleo ĉirkaŭ 521 milionojn da eŭroj ĉiujare. La skribaj tradukoj devus plui ĉe la Parlamento; ili fariĝas en 3 «pivotaj lingvoj»: la Angla, la Franca kaj la Germana.

En Bruselo, homoj pledas por pli bona primajstrado de la lingvoproblemo, substrekante la fakton, ke praktike ne estas eble plenumi la 420 kombinaĵojn

Desegnis Serge Sire - Proponis la tekston Jean Selle.

(Daŭrigo ...21 lingvoj)

inter la 21 idiomoj de estonta granda Eŭropo. En la jaro 2001, la Komisiono singarde proponis reformon, kiun la Parizaj kaj Berlinaj instancoj tuj taksis neakceptebla, opiniante, ke ĝi favorus la uzadon de la Angla, malprofite por ambaŭ aliaj laborlingvoj de la Komisiono, nome la Franca kaj la Germana.

Tiu reformopropono, kiu havis la celon redakti ĉiujn «politikajn» tekstojn nur en la Angla lingvo, estas oficiale «ekzamenata», sed reale blokata. Antaŭ nelonge, la prezidanto de la Komisiono - *Romano Prodi* - esprimis la opinion, ke la ebleco, por ĉiu civitano, «interagi» en sia lingvo kun la Eŭropaj instancoj estas «fundamenta postulo» por demokrata Eŭropo.

En Bruselo, oni tamen demandas sin, kiel la administracio povas, sen kolapso, apliki la principon de kompleta plurlingvismo. Jene komentarias funkciulo: « Ni eble devos demonstri ĝian neeblecon, por ke oni alprenu saĝan solvon». Inter la rimedoj elvokitaj, estas la ideo pluigi la uzon de nur unu, du aŭ tri ĉefaj lingvoj.

Victor Ginsburgh - profesoro ĉe la Libera Universitato de Bruselo - kaj lia kolego *Shlomo Weber* - el la Suda Metodisma Universitato de Dalaso (Teksaso) - precize studis la rangon de la diversaj lingvoj uzataj en la 15-membra Eŭropa Unio. La Angla lingvo estas la plej uzata (208 milionoj da Eŭropanoj asertas, ke ili praktikas ĝin kiel unuan, duan aŭ trian lingvon) antaŭ la Franca (127 milionoj), la Germana (118 milionoj), la Itala (65 milionoj), la Hispana (56 milionoj) kaj la Nederlanda (24 milionoj).

Ambaŭ universitatanoj substrekas la fakton, ke se la Angla estus la sola lingvo alprenita, en la nombro de 45 procentoj loĝantoj de la Unio estus lingve eljetitaj. Tiu procento estus nur 20 en Svedio, sed 58 en Francio kaj 65 en Portugalio, kvankam ĉie oni konstatas rapidan kreskadon de la scio de la Angla lingvo en la junularo. Laŭ *Victor Ginsburgh* kaj *Shlomo Weber*, la aldono de la Franca lingvo malaltigus la nombron da «eljetitoj» ĝis 30 procentoj, kaj la aldono de ambaŭ - la Franca kaj la Germana - ĝis 18 procentoj. Tamen restus «eljetitoj» en la nombro de 31 procentoj en Hispanio, kaj de 28 procentoj en Italio.

Jean-Pierre Stroobants

(La tekston ni legis en la revuo de SAT-Amikaro. Tradukis: André Andrieu)

Ni ricevis...

nombron de esoteraj libroj (esperantlingve) el Brazilo senkoste, sed devis pagi doganon. Kiu interesas ricevi tian libron bv. aldonu afrankon en p.markoj = 1 Euro al la mendilo. Dankon!

A.F.Stephan, Renchener Str.47, 77704 Oberkirch (Baden)

IOM DA ETMOLOGIO

Koohi en la japana lingvo, *kawa* en la malaja, *gafa* en la kamboĝa, *koffie* en la nederlanda ... iu ajn en la mondo, la vortoj por nomi *kafon* iel similas Nu, kio estas la deveno de ĝi?

La historiistoj konsentas, ke la provinco Kaffa (Abisenio en la nuntempa Etiopio) estas la devenloko de kafo. Tamen, la deveno de la vorto *kafo* ne rilatas al Kaffa. Ĝi devenas fakte de la araba vorto *qhawa* (stimulilo). Ĝi estas, kiu inspiras al la botanikistoj la latinan vorton *coffea*, aplikita ankaŭ al la trinkaĵo farita el grajnoj de kafoarboj kaj tiom disvastigita tra la mondo.

Atilio Orellana Rojas

(el: Antaŭen 1/2003 Revuo de la Avilesa Esperanto-Grupo)

Ni serĉas konsilojn...

por la komputilo. Per tiu aparato, kiu estas uzata en la redakcio, ne estas ebla tajpi la -s mit ^. En la numeraro dekstre de la klavaro ni ne trovis ĝis nun necesan metodon kiel ekz. por la ĉ = Alt + 0265 aŭ por la ĥ = Alt + 0293. Same malfacile estas trovi la u kun arko. Pro tio ni uzas jenan aliaĵon - û, kio ja ne estas korekta. - Kiu povas helpi konsile pri tio bv. sendi leteron al: A.Stephan, Renchener Str.47, 77704 Oberkirch Dankon!

Nekrologo

Ni funebras pro nia amiko kaj fidela membro

Fritz Walter Poppeck

Kiu neatendite mortis je la 12. septembro, 2002 en aĝo de 89 jaroj.

Walter aktivis jam antaŭ 1933 en la laborista Esperanto-movado en lia hejmlando Silesio. -Post reveno el la militkaptiteco, li membriĝis al la germana Esperanto-movado kaj en la jaro 1956 ankaŭ al la germana laborista Esperanto-asocio LEA/G. Li estis dum 50 jaroj aktiva membro de la Socialdemokrata Partio kaj multaj jaroj konsilanto en la magistrato de la urbo Oberkirch (Baden). – Kiel sindikatisto li oficis kiel prezidanto de la konsilio en la paperuzino Köhler kaj fine estis membro de la kontrolkonsilio de tiu entrepreno.
Krom tio li aktivis en la movado de la Naturamikoj kaj subtenis la laboron por la ge-aĝuloj (rondo de senioroj) en Oberkirch.
Ni sentos la mankon de liaj aktivecoj kaj spertoj ; neniam forgesos lin.
Ni kondolencas al sia edzino Edith kaj la familianoj.

LEA/G-Estraro k.membraro

Ankoraŭ haveblaj ĉe:
A.Stephan, Renchener Str.47
77704 Oberkirch (Baden)

E. u. M.HJ.Mattusch
Esperanto-ein Ausweg aus Babylon?
(bind., 205 p., i.a.fotoj de LEA/G k.SAT- eminentuloj
12 € (inkl.ekspedkostoj)

Dr Ulrich Matthias
Esperanto - das neue Latein der Kirche
(fest.Einband, 128 S.)
Sonderpreis: 6 €

Pri la kultura vivo
de la Esperanta movado
8 Postkarten - 2 €

Esperanto-Fernkurs II
(Konversacia kurso)
Tonbandkassette
2 €

Pagebla ĉu per banko
ĉu per afrankai markoi
Konto: A.F.Stephan
Nro.629867-806 Postbank
München (BLZ 70010080

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

Informoj el Parizo - de S.A.T. kaj SAT-Amikaro

La 76-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazos en urbo La Chaux-de-Fonds (Svisio) de la 12-a ĝis la 19-a de julio 2003. Detalaj informoj estas haveblaj ĉe la S.A.T.-sideio (67. avenue Gambetta. FR-75020 Paris)

AMIKECA RETO 2002-03

alia turismo al alia mondo

Informilo pri kontaktoj, vizitoj, amikecoj, pli ol 600 adresoj, broŝuro. 143 paĝoj. Prezo: 16 € (inkl.ekspedkostoj)

Havebla ĉe Albert Stephan, Renchener Str.47, 77704 Oberkirch (Baden)

SAT-Amikara Kongreso 19-21 de aprilo 2003 en CAP D'AGDE (Cote d'Azur-Francio)

Detaloj havebla ĉe:

Josée Lafosse, 6, Impasse Gabriel Voisin, FR-31130 Balma

Aperigo konforma al peto farita de *Madeleine de Zilah* - respondeculino por publikigaĵo *La Gazeto* (Creuë, 55210 Vigneulles).

WOZU ESPERANTO LERNEN?

Als Dr.L.L.Zamenhof 1887 die internationale Sprache unter dem Pseudonym „Dr.Esperanto" (d.i. „Der Hoffende") veröffentlichte, hoffte er, dass sich diese Zweitsprache für jeden , weltweit verbreiten werde. Inzwischen ist Esperanto zwar eine lebende Sprache geworden, die von Millionen Menschen in aller Welt täglich angewendet wird, der große Durchbruch aber steht noch aus.

Lohnt es sich da überhaupt Esperanto zu erlernen? Was kann man damit anfangen?

Wenn es nur darauf ankommt, im Ausland „so durchzukommen", der braucht kein Esperanto – das geht mit Deutsch, Englisch oder „Händen und Füßen". Wer jedoch daran interessiert ist, mit Menschen in aller Welt in ein wirkliches Gespräch zu kommen, der ist mit Esperanto bestens bedient!

Das Geheimnis liegt darin, dass jeder diese Sprache relativ leicht und somit perfekt erlernen und sich daher mit anderen Esperanto-Sprechern auch tatsächlich „über Gott und die Welt" unterhalten kann, sei es in Brieffreundschaften oder auf Kongressen. Darüber hinaus stehen ihm eine umfangreiche Literatur, zahlreiche Zeitschriften und Schallplatten sowie eine Reihe von Radioprogrammen in Esperanto zur Verfügung.

Wem an wirkliche Verständigung von Mensch zu Mensch auf der Basis der Gleichberechtigung liegt, der sollte Esperanto lernen!

(aus Esperanto-Schnellkurs der Flandra Esperanto-Ligo Antwerpen, von Hans Koch und Stefan Maul unter der Schirmherrschaft der Esperanto-Zeitschrift MONATO.)-

INFO b.anfordern bei: Freier Esperanto-Bund, Jiri Proskovec, Heimbaustr.10, 44143 Dortmund, ePost: proskovec@mac-com

(Auch, wenn der geneigte Leser schon alles weiß, ist es dennoch zu empfehlen, sich mit der Esperanto-Grammatik zu befassen, um zum Beispiel den Kenntnisstand aufzufrischen.)

Esperanto - kurz gefasst

1. Die Aussprache:

Jedes Wort wird gesprochen, wie es geschrieben wird. Selbstlaute werden halblang und halboffen ausgesprochen (e wie in Messer, o wie in offen). Da Esperanto für alle Nationen geeignet sein soll, ergeben sich folgende Abweichungen vom Deutschen:

c = z (Zitrone-citrono)	ĵ = weiches sch (ĵurnalo
s = ß, ss (Bass-baso)	ŝ = sch (Schiff-ŝipo)
v = w (warm - varma)	aj = ai
z = s (stimmhaft: Rose)	oj = eu
ĉ = tsch (Tschako, ĉako)	ej = ej (wie engl. play-plej)
ĝ = dsch (Dschungel-ĝangalo)	uj = ui (pfui)
ĥ = ch (Jacht -jaĥto)	aŭ = au (wie in Baum)

Die Artikel der, die, das sind in Ein- und Mehrzahl immer - la, der unbestimmte Artikel ein, eine entfällt.
Zum Beispiel: la urbo - die Stadt, urbo - eine Stadt

Hauptwörter enden auf -o: tago - Tag;
Eigenschaftswörter auf -a: granda - groß;
Umstandswörter auf -e: rapide - schnell;
Zeitwörter in der Nennform auf -i: lerni - lernen;
Mehrzahlendung -j: urboj - Städte;
das gilt auch für Eigenschaftswörter -aj;

(Fortsetzung i.d.nächsten Ausgabe.)

FINANCRAPORTO por la jaro 2002 en €

A: Enspezoj	
Havaĵo el 2001	**592,85**
Kotizoj kaj donacoj	**900,90**
Trairinta sumo por *Amikeca Reto (SAT)*	**16,50**
Entute:	**1510,25**
B: Elspezoj	
Eldonoj *MAGAZINO*	**594,05**
al LEA-Komitato de SAT	**15,--**
Libroj pri vivo de Esperanto (SAT, GEA, LEA/G) en Düsseldorf (15) *	**105,04**
Materialo por varbado	**117,33**
Afrankaj elspezoj	**100,07**
Administradaj kostoj	**79,20**
Doganendo **	**4,07**
por *Amikeca Reto* al SAT	**16,50**
Kostoj por la bankkonto ***	**64,59**
Eraro en Kasraporto 2002 de prez.Stephan	**10,--**
Ĝiro al la prezidanto por aktivecoj****	**300,--**
Entute:	**1405,85**
C: Havaĵo je 01.01.2003	**104,40 €**

(Daŭrigo paĝo 10)

D. Indikoj - * Ilin ricevis senkoste membroj, kiuj grandanime donacis. La libro estas havebla ĉe Albert Stephan kontraŭ 8 € (inkl. ekspedo)

** Esp.grupo en Brazilo sendis librojn pri liberpensiajn opiniojn tute senkoste. La asocio nur pagis doganendon.

*** La financresponduio havas kontojn por LEA/G kaj SAT. (Norisbank AG Dortmund (BLZ 76026000) Kto.4907 664 002)

**** La sumo ne alvenis en 2002.

Dortmund, 06.01.2003 subskr.Jiri Proskovec

Estontaj aktivecoj

1. La asocio intencas ekspedi minimume 2 (du) eldonojn de la *LEA/G-Informilo*. Ĝi aperos anstataŭ de *MAGAZINO*, kies enhavo estos nur interrete legebla. Membroj kaj abonantoj, kiuj uzas interreton, do, havas la eblecon, ne nur legi informojn asociajn kaj el la mondo de Esperanto, sed ankaŭ povos ricevi specialajn tekstojn interrete, kies enhavoj estas tro ampleksaj por aperi en informilo, kvankam ĉi tiu revuo prezentos ankaŭ i.a. legindajn artikolojn.

Interreta *MAGAZINO* estas avantaĝa por diskonigi la lingvon kaj la ideon pri Esperanto ne nur en Germanio.

2. La kasenhavo ne plu permesas grandskale aktivi pro manko de necesa mono. La asocio bedaŭrinde perdis kelkajn fidelajn membrojn, kiuj ĝis nun donacis grandajn sumojn resp. subtenis la asocion per kunlaborado kaj konsiloj.

Tamen restas nia tasko, labori idealiste por la laborista Esperanto-movado kaj konatigi nian lingvon ĉie-eble.

3. La membrokotizo restas kiel ĝis nun je 8 € kaj esperantistoj, kiuj interesas legi tekstojn de laboristaj esperantistoj bv. pagi 10 €. Tiu sumo enhavas subtenon de LEA/G.

Proskovec/Stephan